

Numero: 285.
Februaro: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Ne hezitu! Lernu angle!

Mi tuj diras, mi ne estas kontraŭ la angla lingvo! Neniu pensu, ke nun mi deziras kontraŭagiti ĝian lernadon.

Necesas ankaŭ tiu ĉi lingvo.

Kvankam mi konstatas, ankaŭ ĝi estas nur nacia lingvo, kiel la aliaj.

Nuntempe ĝi okupas elstaran lokon inter la lingvoj de la terglobo.

Dum la historio de la homaro ni jam travivis similan privilegecon. Sed ĉiufoje post jardekoj, jarcentoj tiu ĉi floriĝo rapide velkiĝis kaj venis alia lingvo, kiu plenumis ĝian lokon en la internacia komunikado.

En Hungario preskaŭ ĉiutage mi spertas, kiel oni provas, ofte perforte konvinki min, ke mi lernu la anglan lingvon.

Multfoje oni sentas, se iu ne parolas ĉi lingvon, tiam li/ŝi estas duaranga civitano.

Fakte oni uzas la anglan lingvon multloke kaj ĝi estas la gepatra lingvo de miloj da homoj. Malgraŭ tio oni ne rajtas diri unuvoĉe: sen ĝi ne estas vivo sur Tero.

En la hungaraj lernejoj oni ĉefe instruas la anglan, germanan lingvojn, kelkloke sed nur fakultative la francan aŭ iun alian lingvon.

Laŭ mi tio ĉi estas tre danĝera. Hungarion ĉirkaŭas diversaj landoj, kies lingvoj apenaŭ estas instruataj en la lernejoj.

Kiel ekkoni la kulturon, literaturon de niaj najbaroj, se ni ne konas ilian lingvon. Pro tio estas multaj konfliktoj inter la nacioj. Ni ne parolas saman lingvon.

Mi bone scias, ĉies lingvon ellerni oni ne povas. Homa vivo ne sufiĉas ellerni ĉiom.

Ĉu elekti iun lingvon ekzemple la anglan? Laŭ mi tio ĉi tre influas la lernanton kaj vidigis la kulturon, historion kaj ĉion per la okulvitroj de alia nacio.

Tial estus necese neutrala komunikilo, kiu donus pli klaran bildon pri la alia homo. La najbaroj tiel povus komunikiĝi facile kaj senĝene.

Neniu sentus, ke oni uzas ies lingvon, kiu ofte malrapide kaj malfacile lernebla.

Neŭtrala lingvo pli faciligus la ineternacian komunikadon por ĉiu, eĉ ankaŭ por la angle parolantoj.

-Ne hezitu! Lernu angle! – mi aŭdis antaŭ nelonge en radio – Tamen mi demandas, ĉu vere oni lernu nur tiun ĉi lingvon?

-Redaktanto-



Fanfaranulo

-Mi parolas ĉiun lingvon. Sur la terglobo ne ekzistas lingvo, kiun mi ne konas. Kie ajn mi estas mi povas komprenigi min. Kiel ĝi povas esti? – Ĉu vi demandas?

Mi naskiĝis tiel. Jam infanaĝe mi parolis multe da lingvoj. En la infanĝardeno la vartistinoj ege ekmiris, kiam mi komencis paroli en la hispana lingvo. El ili unu tuj demandis: Ĉu knabeto via patro estas hispano? Mi ridetante respondis: Ne, onjo Elinjo. En mia familio ĉiu estas hungara. – Eble viaj gepatroj parolas tiun ĉi lingvon? – demandadis plu la vartistino. Mi neis mute per mia kapo – ne. Mi scias ankaŭ aliajn lingvojn, onjo Elinjo. Mi scias multe da lingvojn. – Ĉu? – denove ekmiris la infanvartistino kaj ŝi venigis al si la koleginojn kaj serioze diris: - Vidu, tiu ĉi knabeto parolas plurajn lingvojn. Ĉu vi jam renkontis tian ĉi knabeton? Fantaste. Li estas vera lingvotalento.

Ankaŭ la koleginoj tre miris kaj ili demandadis min unu post la alia: - Diru ion al mi en la hispana lingvo! Diru ion al mi en la greka lingvo! – Ili ankoraŭ ripetis ĝin plurfoje. Mi apenaŭ povis respondi al iliaj demandoj. Fine iliaj demandoj kaj petoj tre enuigis min. Mi mutiĝis kaj vane ili petis min, mi ne respondis. Mi ne parolis en fremda lingvo. Mi kuregis al la aliaj geknaboj por ludi.

Simila estis la situacio ankaŭ en la lernejo. Mi ne devis lerni devigite fremdan lingvon, kiel miaj lernejoj kamaradoj. Ili tre enviis min kaj ili demandis, kiel mi povis ellerni ĉiun ekzistantan lingvon. Mi estis miraklo en la lernejo. La direktoro estis tre fiera pri mi.

Post miaj studadoj mi vojaĝadis en la mondo. Mi ne havis lingvajn malfacilaĵojn, eĉ ankaŭ en Afriko en la ĝangalo mi povis komprenigi min kun la indiĝenoj, kvankam oni parolas alian lokan lingvon en ĉiu vilaĝo. Apenaŭ mi trovis tian vilaĝon, kie la lingvo similis al la najbara. Pro tio ofte erupciis milito.

Mi kompatas vin, ĉar vi parolas neniun lingvon. Kiom bone, se oni konas kaj parolas lingvojn. Ĉu ne?

Se vi deziras, mi helpas lerni al vi mondlingvojn. Se vi ellernos almenaŭ ses – sep lingvojn, mi garantias al vi, vi ne havos lingvan malfacilaĵon. Nu, ĉu vi deziras mian helpon? Por unu lernohoro mi petas 50 eŭrojn. Ĝi estas tute senpaga....

-Dankon, sed mi prefere lernos Esperanton.

-Ĉu Esperanton? Tiun lingvon mi ne konas, eĉ mi ne parolas. En kiu lando ĝi estas parolata?

-Ŝaŝa-



Poezio

En Esperantujo estas multaj talentaj poetoj. Ni hungaroj povas fieradi. Ni donis bonegajn poetojn al la mondo.

Certe ĉiu konas la du elstarajn hungarojn: Kalocsay kaj Baghy.

Ili ĝojigis nin per multaj grandiozaj poemoj, noveloj, rakontoj studaĵoj kaj romanoj. Sen ili Esperanto kulturo estus pli malriĉa.

Kial la riĉeco, se oni ne legas? Do legu ĉiutage ankaŭ Esperanto-verkaĵojn!

Mi garantias, vi travivos neforgeseblajn minutojn.

Cezar Balkona alvoko

"Venu al mi,
venu al mi,
sed ne tie ĉi;

venu tra l' pordo,
sed ne kiel hordo
al mamzona bordo.

Venu al mi,
venu al mi
atendas vin mi."

Tion pensas ni,
sed ne ŝi.
Ŝi pensas
pri Franci'.



Alfred Bilz Fidela al la naturo

Ekrisku do kaj al feliĉa celo
Bona vojo restos nur por vi,
De l' sano lumos al vi klera stelo
Se batalados vi kun energi'.

La membroj kaj la korpo tre fortiĝos,
Se bruston ĉirkaŭfluas freŝa vent'.
La maljunulo tiam rejuniĝos
vi eniros al la Tra lia korpo iros nova sent'.

Se estos puraj nutro, faro kaj la penso,
Purestos ankaŭ la animo via.
Tiam regados ĉiam vin plej granda ĝojo
Al bonfarado kaj al gajkuraĝo via.

„Feliĉo esta sano“, tiu vorto
en via koro brilu sur la voj'.
Ĝi vin kondukos al ĉiela pordo,
Tra kiu ĝoj'.



PS: Tiom da optimismo estas preskaŭ timiga, ĉu ne:)? Kaj tamen, certa vero estas en tiu poemo, fideleco al la naturo estas pli bona ol blinda kredo aŭ tro idealisma ebontura filozofio. Feliĉo estas ankaŭ korpa afero, en sana korpo povas (ne devas esti!) ankaŭ sana spirito. La naziuloj pruvis la malon. Kaj ankaŭ homoj tiaj, kiaj Stephen Hawking kompreneble pravas, ke la enhavo de la poemo ne estas la tuta vero. Ankaŭ malsanulo povas bataladi kun energio, ja eĉ kun pli da energio ol sanulo. Kiel ĉiam, la vero estas relativa. (cez)



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XX-a

Sur la planedo ĉio estis dezerta kaj senviva. En la foro vidiĝis kelkaj konstruaĵoj, sed kiel ruinoj. Neniu akceptis ilin.

Ili devis tuj forlasi la kosmoŝipon.

Kelkaj ekzelitoj posedis petegante skafanderon. Laŭ ili eliĝante ili tuj sufikiĝos pro la manko de aero.

-Ne murdu nin! Almenaŭ donu al ni skafanderon ĝis ni atingos la konstruaĵojn!

El la megafono aŭdiĝis trankviliga voĉo:

-Ne paniku! Sur la planedo jam estas sufiĉe da aero por la homa organo. Vi ne sufokiĝos. Vin atendos aliaj danĝeroj. Vi havos bonŝancon, se vivante sukcesos iri al via difinita loĝloko. Adiaŭ!

La megafono mutiĝis. La ekzelitoj malgaje, kelkaj ploranta ekiris al la malfermita elirejo.

Ŝajne ĉiu tremis pro la timo. Kio atendos ilin ekstere?

Onidire diversaj bandoj kaŝiĝis proksime de la kosmoŝipo por ke la nova transporto estu atakata. Ĉiam tiel okazis. La restintaj homoj, kiu sukcesis eviti la morton atakas la novalvenintojn. El ili multaj estas murditaj kaj ili deprenas ilian havaĵon, kvazaŭ tie ĉi estus grave, se oni havas monon aŭ alian trezoron.



Lastfoje ĉiuj ekzelitoj estis murditaj kaj poste la bandanoj kvereliĝis pro la ĉasaĵo. Dum la longa pafado apenaŭ restis vivulo. Kiuj ne mortis retiriĝis en la ruinajn konstruaĵojn.

Eble nun ili atendas ilin bone armitaj.

Kiel defendi min? – demandis de si Johano. – Se almenaŭ ni havus armilojn.

La onklinon Izabela ne interesis, kia sorto atendos ilin sur tiu ĉi damnita planedo. Ŝi daŭre ridetis, kvazaŭ ŝi estus frezeziĝinta. Multaj homoj estis en tiu ĉi situaco, nur kelkaj povis rigardi ĝin klarokule kaj fari planon por la estonto.

Estus malfacile diri, al kiu grupo apartenis Johano. Lia animagordo ŝanĝiĝis en ĉiu minuto. Elpaŝante el

la kosmoŝipo li ĝuste kredis, ke fine ĉio pliboniĝos. Tio ĉi estas nur malbona sonĝo, kiel en la kelo. Ankaŭ tie li transvivis la teruraĵojn.

Sur la surfaco de la planedo li tuj komencis tiregi perforte sian onklinon, kiu ekkantis gajan kanzonon.

-Onjo, ne kantaĉu! – kriegis al ŝi Johano. – Ni kuregu! Vidu tie sufiĉe proksime estas roko. Espereble tie ni trovos konvenan ŝirmejon.



Estis tre malfacile savi la onklinon por ke ŝi ne promenu en la manojn de la bandanoj.

Kiuj kuregis al alia direkto, tiujn baldaŭe la kaŝiĝintaj uloj komencis pafadi per diversaj armiloj. Vere Johano ne estis certa, sed kvazaŭ ili estintus ankaŭ mortiro. Li aŭdis plurfoje grandajn eksplodojn.

Li pravis. malantaŭ la roko ili trovis bonegan ŝirmejon. Vere li ne komprenis, kial la bandanoj, ne okupis tiun ĉi lokon. De tie ĉi ili estus pafintaj pli bone la novalvenintoj. Ja inter la roko kaj kosmoŝipo estis nur cent metrojn distanca.

Johano provis fari planon por atingi la konstruaĵojn, kie laŭ li ili estos en sekureco. Li ne sciis, kial li pensis tion.

Dume la onkline Izabela silentiĝis kaj restis trankvila. Ŝi ne parolis al Johano. Aliffoje ŝi estis tre babilema. Ŝi ĉiam devis paroli, kaĉadi, diri la aŭditajn novaĵojn.

Ŝi sidis mute sur la surfaco kaj ludis per ŝtoneroj. La ŝtoneroj estis diverskoloraj. Sur Tero kaj Luno ne estas tiaj ĉi. Ankaŭ iliaj formoj estis interesaj. Preskaŭ ĉiu estis rondformaj. La koloro de la plej multaj ŝtoneroj estis ruĝaj.

Izabela metis la ruĝajn ŝtonerojn en malgrandan kavon, kiun ŝi trovis tie.

En la kavoj jam estis almenaŭ dekduo da ŝtoneroj, tiam okazis io pri kio ili ne pensis.

Sub ili la surfaco ekmovis. Unue Johano pensis, ke estas tertremo, sed baldaŭe la surfaco malfermiĝis kaj antaŭ ili estis mallarĝa ŝtuparo, kiu kondukis malsupren ien.

-daŭrigota-



Por infanoj

LA PIGRA KATO



Kaj estis kaj ne estis, trans la Fabeloceano vivis pigra kato. Dum la tuta tago ĝi nur dormetis apud la varma formo.

Ĝi ne deziris ĉasadi la musojn, kvankam ili tre multobliĝis en la dometo de la maljunulino.

Komence la maljunulino provis konvinki sian katon ke ĝi kaptu aŭ forpelu la musojn. Sed kiam ŝi vidis, la kato prefere kuŝas apud la forno ol kaptadi la musojn, ŝi tre koleriĝis.

-Aŭskultu min, kato mia! – ŝi diris al la pigra besto – En la domo estas multe da musoj. Ili manĝas ĉion en la nutraĵkamero. Mi ordonas al vi tuj kapti la musojn! Se ĝis la morgaŭa mateno, eĉ unu muso cincados tie ĉi mi forpelos vin de la domo.

La kato vole nevole devis kaptadi la musojn. En la nutraĵkamero ĝi baldaŭ enuiĝis. Krome tie ĉi estis malvarmo. Mankis al ĝi la komforta kuseneto sur kiu ĝi kutimis dormeti.



La nokto ĝis mateno estas tre longa – pensis la kato.

Ĝi cerbumis, kion fari, ke ĝi ne devu kaptadi la musojn? Nenio bonega ideo venis en ĝian kapon. La kato malgaje sidis en la malhela angulo de la kamero.

Subite malgranda muso ekaperis antaŭ ĝi ridante demandis:

-Kial vi malĝojas? Neniam vi kutimis sidadi en la kamero. Kio okazis al vi?

-Ho, malgranda museto, mi estas ege malĝoja, se ĝis mateno mi ne kaptos vin mia dommastrino forpelos min. Kiom bonege mi vivis apud la varma forno!


-Se vi volas, mi volonte helpos al vi.

-Ĉu vi? – ekmiris la kato. – Mia dommastrino deziras, ke mi kaptu vin.

-Pro tio ne ĉagrenu! Se ĉiutage donacos al mi kolbason, tiam mi kun miaj fratetoj kaŝiĝos kaj la maljunulino kredos, ke vi kaptis nin.

La ideo plaĉis al la kato. Verdire ĝi ne suspektis, ke la malgranda muso trompos ĝin.

Ĝi kontente ekdormis kaj atendis la matenon.



Dume la malgranda muso invitis al la kamero ĉiun cincanton, kiu estis en la vilaĝo kaj ili faris grandan festenon en la nutraĵkamero. Ili manĝis ĉion lasante nur unu kolbaseton, kion ili metis antaŭ la dormantan katon.

La nutraĵkamero estis prirabita. Ĝis la lasta ero la musoj manĝis ĉion.

La kato vekigante ne rimarkis, kio okazis. La ĝojo blindigis ĝin, eĉ ĝi ne rimarkis la kolbason antaŭ ĝi. Eble ĝi pensis duondormante, ke la dommastrino donacis ĝin al sia ŝatata kato.

Ankaŭ la maljunulino estis scivola, kiel ĝi laboris? Ĉu la musoj malaperis el la nutraĵkamero.

Estis profunda silento. Ŝi ne aŭdis cincadon, kiel en la antaŭaj tagoj. Ŝi malfermis la pordon kaj ŝi preskaŭ svenis ekvidante la dormantan katon kun kolbaso.

La maljunulino tre koleriĝis. El la nutraĵkamero malaperis ĉio. Certe la kato manĝis ĉiom da kolbasoj, lardoj, fromaĝoj ktp.

Ĉe la pordo de la kamero ĝuste estis balailo. La maljunulino kaptis ĝin kaj komencis bategi la surpizaĝan katon, kiu tuj eksaltis kaj eble ankaŭ nun ĝi kuras, se intertempe ĝiaj piedoj ne foruziĝis.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

-Onklo Adalberto-



KARNAVALO

KARNAVALO

